

## MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr (inkl. sendkoston), je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. Abono akceptata. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 int. respondkuponoj. Nroj 1/43 kaj 2, 3, 4/44 vendataj por po 0,55 kr. — Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝtokonto 26 80 23.

PREZO: 1.- Kr.



MALGRANDA

# REVUO

N:RO 2

1947

5-a JARO

### ENHAVO:

	Paĝo
SEP FRATOJ de Stellan Engholm .....	1
KIO ESTAS INTELEKTULO? de D. v. der Stempel .....	9
LA FUNDAMENTO DE LA VIVO .....	15
H. N. BĴALIK de J. Kohen-Cedek .....	21
KIAM TRO LONGAJ TEDE PASOS ĈIUJ TAGOJ ... de H. N. BĴalik .....	23
VOĈOJ DIVERSLANDAJ .....	26
KOLEKTIVA RESPONDECO de Stellan Engholm .....	31

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

## Sep Fratoj

De STELLAN ENGHOLM

Aleksis Kivi, la aŭtoro de Sep Fratoj, naskiĝis 1834 en la suda parto de Finnlando, iom norde de Helsinki. Li estis lernema knabeto kaj akiris iom da elementa instruo. Por metia laboro li ne havis inklinon. Tial oni sendis lin al Helsinki por studi.

Li venis tien, kiam li estis 12jara. La tiutempa lerneja lingvo estis la sveda. Ĉar la gepatra lingvo de Kivi estis la finna, li devis unue studi la svedan. Maljuna maristo instruis lin. Poste li estis akceptata en gimnazio. Nur en 1857 li fariĝis studento. Malriĉo kaj malsano malhelpis la studojn. Kiel studento li vizitis prelegojn sed ne studis plane. Klasikan erudicion li ne akiris, kaj li malmulte okupis sin pri literaturo kaj estetiko de la moderna tempo. Multe da literaturo li ne legis, sed li profunde konis kelkajn fundamentajn verkojn: la Bibliion, la verkojn de Shakespeare, Don Kihoto, la finnan nacian epopeon Kalevala, la verkojn de la dana komediverkisto Holberg.

En 1860 aperis de li tragedio. Ĝin premiis Finna Literatura Societo, sed cetere ĝi estis malvarme akceptata. Post mizero kaj neregula vivado li 1862 definitive forlasis Helsinki kaj ekloĝis en la kamparo. Iu maljuna fraŭlino ebligis al li verkadon, donante al li loĝejon kaj la plej necesan vivosubtenon. De tiam li dediĉis sin sole al verkado. Lia ĉefverko, Sep Fratoj, aperis 1870. La du lastajn jarojn de lia vivo katenis lin nekuracebla mensa malsano, kaj oni sendis lin al la malriĉulejo de lia hejmmregiono. Li mortis la lastan tagon de la jaro 1872.



En esperanto troviĝas jam delonge liaj tri ĉefaj teatraĵoj: la komedioj *La Botistoj* kaj *La Fianĉiĝo* kaj la bibliomotiva *Lea*. La unua prezento de tiu lasta en 1869 signifis la naskiĝon de la finna teatra vivo, kiu, preterpase dirite, estas unika kultura manifestado, rilate ne nur al aktiveco sed ankaŭ al kapablo kaj alta nivelo.

Kivi estas la patro de la finna dramo kaj ankaŭ de la finna rakontado. Lia signifo por la finna kulturo estas fundamenta. Lia vivokreaĵo estas tamen ankoraŭ pli signifa. Per *Sep Fratoj*, nun aperanta en esperanto, li kreis verkon, kiu havas sian ĝustan lokon apud la *Odiseo* kaj *Don Kiĉote*.

Popolkleriga virino provis antaŭ dudekkvin jaroj konatigi al mi *Sep Fratojn*. "Vi ne konas Kivin? Nepre vi devas legi *Sep Fratojn*! Ho, estas tiel mirinde, estas kiel *Homeros*!"

Mi ne ŝatis la altrudon, kaj la komparo kun *Homeros*, kiun mi tiutempe ankoraŭ ne legis, ne entuziasmigis min. Kivi, Kivi! Neniam mi aŭdis tiun nomon. Por ne esti malĝentila mi tamen akceptis la prunton kaj ankaŭ provis legi la libron. La enkonduko, kvankam nelonga, ŝajnis al mi teda. Poste *sep fratoj*, la ĉefpersonoj de la libro, komencas interparoli, paŝon post paŝo. La aŭtoro senescepte en la dialogoj metas unue la nomon de la parolanto kaj dupunkton kiel en teatraĵo. La libro tamen pretendas esti romano aŭ rakonto, ne teatraĵo. Kaj ĉio temas pri kamparaj, primitivaj aferoj. Kiom signifas tiuj fratoj, kvankam *sep*, apud la tri fratoj *Karamazov*! Tiel mi pensis pri tiu libro. Post kelkaj semajnoj mi redonis ĝin nelegita kaj ĝentile diris, ke mi legis ĝin sed ĝi ne multe impresis al mi.

Du jarojn poste iu amiko, kies literaturan guston mi alte taksis, donacis al mi la saman libron. Denove mi komencis legi, sed nun malrapide, esplorante. Post dudeko da paĝoj mi rimarkis, ke mi komencas konatiĝi kun tute nova mondo, kiun mi tute ne atentis, kiam mia rigardo unufoje traglitis la paĝojn. Post ankoraŭ dudeko da paĝoj mia antaŭa koncepto pri *Sep Fratoj* estis tute ŝanĝita.

Mi konas homojn, kiuj havis la saman sperton kiel mi pri tiu libro, kaj tial mi rakontis tiun flankan epizodon por averti vin kontraŭ rapidemo kaj ŝablona prijuĝo. Oni ne povas legi

ĝin flugrapide kiel modernan, okazotiklan romanegon. Oni devas legi malrapide kaj enviviĝi en la medion. En tiu okazo oni preskaŭ persone konatiĝas kun la fratoj, kaj la libro donas multe da ĝojo, da belo kaj da profunda pripensado pri la tuta vivo.

Kiam la rakonto komenciĝas, la plej aĝa el la fratoj estas 25jara, la plej juna 18jara. Ili loĝas en arbarregiona bieno, kiun ili heredis de la gepatroj. La patro antaŭ longe mortis, ankaŭ la patrino estas mortinta. La fratoj ne havas intereson por bona laboro, ili vivas laŭ sia plaĉo, ĉasas en la arbaroj kaj pasigas sian tempon iom sovaĝe.

Jen ili komencas pensi pri sia vivado kaj la estonto. Ili konstatas inter alie, ke la domo bezonas mastrinon. Montriĝas, ke preskaŭ ĉiuj revas pri la sama knabino, kaj ili estas proksimaj al interbatiĝo. Prudento tamen superregas, ili decidis svati ŝin laŭvice, kaj tiu havu ŝin, kiun ŝi volas akcepti.

La svatovojaĝo mizere fiaskas kaj finiĝas per batalo kontraŭ batalemaj vilaĝanoj. Poste la fratoj daŭrigas sian vojon al la preĝeja vilaĝo por tie plenumi alian taskon. Ili estas vokitaj de la kantoro por lerni legadon kaj la elementojn de la kristana kredo.

Sidi inter kvar muroj kaj lerni abc kaj akcepti punon de la kantoro estas tamen ne eltenebla al la fratoj. Ili forkuras. Sur la hejmo ili sendas insultajn salutojn al la kantoro kaj la preposto. Iom poste atakas ilin la ĵus menciitaj vilaĝanoj, nun pli multnombraj, kaj kiam la fratoj fine venas hejmen, ili estas en terura stato.

Ili estas malkontentaj pri si mem, ankoraŭ pli pri aliaj homoj, krome timas la leĝon. Tial ili por dek jaroj forluas sian bienon al najbaro kaj mem iras en la sovaĝejon por tie konstrui domon kaj vivi tute libere, vivtenante sin sole per ĉasado kaj fiŝkaptado. — En la kristnaska nokto brulas ilia domo, cetere pro ilia propra kulpo. Nudpiedaj kaj vestitaj sole per siaj ĉemizoj ili devas en neĝo kaj malvarmo kaj persekutataj de lupoj kuri la longan vojon al sia antaŭa hejmo por tie serĉi protekton.



Sed frue en la sekvanta printempo ili reiras al la sovaĝejo kaj konstruas novan domon. En la somero ili travivas teruran kaj por ili sortogranan aventuron. Dum ĉasekskurso ili estas atakataj de kvardek furiozaj bovoj, kiuj paŝtas sin en la arbaroj. La fratoj saviĝas grimpante sur grandegan ŝtonon, sed tie ili devas resti, sieĝataj de la bovoj dum multaj tagoj, fine preskaŭ mortantaj pro malsato kaj soifo. Por savi sin ili fine mortpafas ĉiujn bovojn — pafilojn kaj municion ili kunportis sur la ŝtonon.

Por pagi la mortigitajn bovojn ili devas komenci kulturi la sovaĝejon kaj produkti grenon. Al terkulturado devigas ilin ankaŭ rapida malpliigo de ĉasbestoj. Iom post iom ili transformiĝas en terkulturistojn, eĉ tre laboremajn. Ilia menso ŝanĝiĝas. Ili forsendas la plej junan fraton por lerni legadon, kaj poste li instruas la aliajn. Kiam la dek jaroj pasis, ili repaciĝas kun la kantoro, la preposto kaj siaj najbaroj. Per tio finiĝas la ĉefa parto de la libro. Poste sekvas nur kelkaj epizodoj el ilia posta vivo.

Mi trovis necese mencii la suprajn detalojn en la libro por doni loman imagon pri ĝia enhavo. Bedaŭrinde ili tamen ne povas doni imagon pri la csenco.

Kiel dirite la pli granda parto de la libro konsistas el interparoloj. Krom en la fino la linioj aŭ paĝoj de rekta rakontado estas malmultaj. Tiu nekutima verkadformo (oni ne povas kompari tiujn interparolojn kun la dialogoj de ordinaraĵ romanoj) estas en Sep Fratoj feliĉa solvo de la rakontoteknika problemo. Kivi estis unualoke teatra verkisto. La teatra dialogo estis lia natura esprimformo. En la fino de la libro li pli amplekse uzas rektan rakontadon, kaj oni tuj sentas la diferencon. Li uzas same bonajn vortojn kaj figurojn kiel aliloke, sed tamen oni sentas, ke io mankas. Mankas tiu interna streĉeco, tensio mi ŝatus diri, per kiu vera rakontisto katenas la animon de la leganto, kaj kiun ni retrovas ankaŭ ĉe Kivi, tuj kiam liaj figuroj malfermas la buŝon.

Sen la dialoga formo Sep Fratoj eble estus ankoraŭ unika libro, tamen certe ne tiom signifa, kiom ĝi nun estas. Ĉu tiuokaze ne pli feliĉe, se Kivi estus verkinta teatraĵon? Ne, ĉar

la relative malmultaj kaj mallongaj rakontaj partoj donas al la verko apartan kaj tre gravan valoron. Kiel teatraĵo ĝi certe estus bonega verko, sed ĝi ne estus unika geniaĵo. Teatroverkaj figuroj estas esence homoj sen ĉirkaŭanta naturmondo, aperas en certa senco en malplena mondspaco. Per la rekta rakontado Kivi donas al siaj figuroj plenvivan ĉirkaŭmondon, same vivan kiel ili mem, la tutan universon en kiu ili vivas kaj de kiu ili samtempe estas malgrandaj partoj.

Tiu naturproksimeco, mi volus preskaŭ diri komunvivo kun la naturo, estas esenca trajto en Sep Fratoj. Tiu trajto troviĝas cetere en la tuta finna literaturo kaj en la finna arto, ankaŭ en altkulturaj verkoj, kaj donas al ili specialan freŝon kaj vivoplenon.

Origina kaj primitiva estas la menso kaj la vivado de la fratoj. Tiu vivo tamen enhavas ĉion, en simpla formo, kio troviĝas en evoluinta socio. En la interparoloj de la fratoj troviĝas neniu vorteto kaj neniu penseto, kiu ne estas plene vera esprimo de la koncerna persono kaj la medio. Tamen la primitiva kaj laŭreala rezonado havas tre vastan signifon, eĉ universalan. Antaŭ sia foriro al la arbaro la fratoj rezonadas pri sia situacio, pri justo kaj maljusto, pri juro, pri plenumo de homaj kaj diaj ordonoj. Ĉio estas tre primitiva kaj tre ridiga. Sed jen la leganto eble rimarkas, ke tiuj ŝajne simplaj kaj krudaj vortoj validas por la tuta homa socio, ke ĉiuj saĝuloj kaj filozofoj en la mondo verŝajne povus nenion esencan aldoni al la meditoj kaj konstatoj de la arbaraj simpluloj.

Same okazas, kiam la rakontisto inter la fratoj en kelkaj lokoj rakontas lokajn fabelojn por distri la aliajn. Unue oni eble demandas, kial la aŭtoro enmiksas tiujn flankajn aferojn en la rakonton pri la fratoj. Sed malofte tiaj enkomponaĵoj tiel perfekte plenumas sian taskon kiel tiuj. Atenta leganto ekvidas, kiel forte kaj bone ili estas esprimoj de subsentoj kaj subsopiroj en origina kaj primitiva animo, de ankoraŭ nekonsciaj revoj pri homa atingo al harmonio, belo, senfineco.

En la rilato de la fratoj inter si kaj al aliaj homoj kaj en iliaj travivaĵoj ni same trovas universalecon. En ilia primitiva vivo kaj pionira laboro en la arbaro ni retrovas aferojn, kiuj



estas gravaj por socioj kaj popoloj kaj por la tuta homaro. En la vivo kaj evoluo de la fratoj ni trovas mirindan ilustraĵon pri la evoluo de la homaro.

Ankoraŭfoje mi volas akcenti, ke malgraŭ tiu universaleco, tiu profundsenceco de la rakonto en ĝiaj detaloj kaj kiel tuto, la libro estas tiel realisma, tiel realofidela, kiel entute estas eble. Kivi ne enmanipulis tiun profundan enhavon en la animojn kaj la vivon de la fratoj. Ĝi vere troviĝas tie (kiel ĝi troviĝas en ĉiu vivo, se ni nur vidas ĝin). Tiel realo kaj simbolo estas unu.

Kivi estas tute realisma, kaj li redonas la homojn kaj la vivon laŭ tio. Li ne ŝanĝas la homojn laŭ eventualaj propraj sopiroj. Se iu el la fratoj el certa vidpunkto estas iom stulta, la aŭtoro neniel malkaŝas tion, kaj li ne provas eduki lin. Li ne provas solvi grandajn problemojn, kaj li neniam revas. Li observas, konstatas, pentras. Sed meze en tiu objektiveco ni sentas intensan spiritan vivon subjektivan, lian luktadon pri la plej grandaj el problemoj: la homo mem kaj la tuta ekzisto.

Lia mondbildo certe estus neeltenebla, se ne troviĝus en ĝi du aferoj: poezio kaj humoro. Lia propra rakontado kaj ankaŭ la dialogoj estas saturitaj de poezio tiel riĉa kaj profunda, kian ni trovas nur en la ĉiurilate originaj verkoj de homoj kun matena freŝo en sia animo. Tiu poezio estas same naturproksima kaj realofidela kiel la rakontado. En la tuta libro troviĝas certe neniu esprimo, eĉ neniu frazo, kiu ne troviĝis aŭ almenaŭ estis tuta natura en la parolata lingvo de la hejmlando de Kivi.

Same saturita estas la libro de humoro. Estas ĝi, kiu donas la necesan vivovarmon kaj faras la vivon eltenebla, eĉ kiam ĝi ŝajnas preskaŭ ne eltenebla. Situacioj, okazoj, homoj kaj interparoloj estas plenaj de humoro, kiu estas paciga kaj trankviliga, en kiu troviĝas profunda saĝo. Ĝi neniam estas cinika, neniam moka aŭ satira.

Leganto, kiu postulas de aŭtoro perfektan komponadon kaj altkulturitan stilon kun eleganta frazkonstruo, trovas multajn mankojn en Sep Fratoj. La kompono estas ĝenerale kruda kaj foje nekontentiga eĉ en la plej bona parto de la libro, kaj

la fino ŝajnas kiel aldonaĵo mallerte farita kaj mallerte alfiksitita. Tamen tio rilatas nur al la formala flanko de komponado. Rilate al la esenca enhavo, al la interna vivo de la libro, ĝia animo, nenio estas forgesita, kaj ĉio venas en ĝusta ordo. Eĉ la formale malforta fino estas, tiel rigardata, noriproĉebla.

Oni povas diri la samon pri la lingvo. Ĝi ne estas ĉizita kaj polurita. Esence ĝi estas la lingvo de lia hejmlando, multe influita de la biblia lingvo. Troviĝas tie kaj tie iom mallertaj frazkonstruoj, nenecesa ripeto de vortoj, formale tedaj frazkomencoj. Kaj tamen komprenanta leganto ne kritikis. Tiu stilo estas maleleganta, sed ĝi havas la tutan riĉon de primitiva lingvo, kiam ĝi estas plej bona, kaj multaj formale altkulturitaj stiloj ŝajnas apud ĝi senvivaj ornamaĵoj.

La finnoj havas proverbon, kiu esprimas amon al hejmo, hejmlando: *Propra tero — frago, fremda tero — blubero*. Alilingvanon ĝi unue frapas per sia atmosfero de netuŝita primitiveco. Sed kiam oni eniĝas en tiun atmosferon, oni trovas en ĝi senfinan riĉon; freŝa, juna vivo troviĝas en ĝi. Same estas rilate al Sep Fratoj. Ĝi estas kiel laŭforme kruda skulptaĵo el kruda kaj simpla ligno, sed ĉiu tranĉo estas farita per genia inspiro, kaj tial la krudaj formoj esprimas superajn belon kaj saĝon, sugeste montras al ni formojn ankoraŭ pli delikatajn kaj subtilajn ol tiuj, kiuj troviĝas en formale perfektaj verkoj.

Ĉu Sep Fratoj povas vekti eĉ homoj el aliaj medioj kaj aliaj klimatoj la samajn sentojn kiel eĉ finnoj kaj svedoj? Ĉu homoj, kiuj neniam sentis la odoron de ligna gudro kaj karbigstaka fumo, de betulaj folioj kaj piceaj pingloj, kiuj neniam aŭskultis la susuradon kaj muĝadon de grandaj arbaroj, kiuj neniam spertis la malfacilaĵojn kaj la kontentiĝon de la vivo en malabundaj regionoj — ĉu ili povas senti, kompreni kaj ĝui tiun libron kiel ni nordanoj? Eble ne tute kiel ni, tamen sufiĉe, mi kredas, por kapti ĉion esencan en ĝi.

Mi intencis fari resuman analizon de Sep Fratoj, sed mi trovas, ke eĉ resuma analizo estas preskaŭ nefarebla en formo de mallonga artikolo. Tro multe restas ne menciita, tro multe



nur aludita. Tial estu sufiĉe, se la dritaj vortoj povos almenaŭ vekti intereson por la ĉefverko de la finna literaturo.

Kaj la esperanta traduko?

Ĝi estas tre fidela al la originalo. Se esprimoj, frazkonstruo aŭ eĉ interpunkcio foje ŝajnos al vi iom mallertaj, tio dependas ne de mankanta kapablo de la tradukinto sed de emoj resti fidela al la originalo. Kiam mi tradukas, mi ordinare iom pli cedas al esperantostilaj konsideroj. Sed mi ne kuraĝas diri, ke traduko laŭ tiaj konsideraj estas preferinda. Kiam temas pri tia verko, kia estas Sep Fratoj, estas tre grave kiel eble plej multe konservi la originalajn ecojn. Mi aldonu, ke tiu fideleco al la originalo tute ne signifas, ke la traduko estas rigida amasigo de vortoj. Kontraŭe, kvankam la lingvo foje estas iom peza kaj nepolurita, ĝi ĉie ŝajnas al mi plenviva esperanto.

Legante la tradukon mi jen kaj jen komparis ĝin kun la sveda traduko de Laurén kaj laŭpove ankaŭ kun la originalo. Tiu sveda traduko estas brila libro. Dum la komparado mi tamen ekhavis la senton, ke ĝi iom perdis de la origina finneco kaj anstataŭe havas certan svedfinnan nuancon (de la sved-regiona Finnlando), ke la sep fratoj en ĝi ne estas puraj finnoj sed en ioma grado svedfinnoj. Mi tro malmulte konas la finnan lingvon por povi decidi, ĉu tiu impresio estas vera aŭ nur imago — tion nur ambaŭlingvaj finnlandanoj povas decidi — sed ĉiuokaze ŝajnas al mi, ke la esperanta traduko estas pli proksima al la originalo.

Neniu lingvo povas doni pli ol palan imagon pri la plej belaj poeziaj partoj de Sep Fratoj, ĉar la finna vortmuziko kun ĝiaj aliteracioj kaj asonancoj ne estas redonebla. Sed kiom traduko povas fari por redoni la originalon, tiom certe faras tiu esperanta traduko.

## Kio estas intelektulo?

De D. v. der STEMPEL

La aŭtoro uzas la vorton intelektulo pri homo, kiu havas aktivan, riĉan spiritan vivon. La vorto kulturo estas uzata, almenaŭ ĉefe, en senco de instruiteco, erudicio. Mi atentigas pri tio, ĉar la vorto intelektulo estas foje uzata en pli limigita senco, pri persono, kiu okupas sin sole pri scio kaj pensado. Kulturo estas alie uzata ankaŭ en senco ĝuste de spirita vivo, uzo kaj evoluigo de la spirita kapabloj. — Red.

Ofte ni miras pro tio, ke ni renkontas personojn kun alta socia situacio, kiuj tamen havas malgrandan intelektulecon, dum aliaj personoj, kvankam havante modestan situacion, estas veraj intelektuloj. Tiu fakto tamen ne estas tiel paradoksa, kiel ĝi unuavide ŝajnas: materialisto zorgas nur pri sia propra bonfarto. Li ne perdas sian tempon okupante sin pri problemoj ĝeneralaj, pri plibonigo de la homa vivo. Li dediĉas sian tutan vivon, ĉiujn siajn klopodojn, de frumatene ĝis nokte, al sia propra materia bonstato, neniam perdante el vido siajn proprajn personajn interesojn. Do ne estas mirige, ke li povas pli bone sukcesi en la vivo, pli facile trovi kaj plibonigi sian socian staton. Se oni devus respondi al la demando "Kiamaniere sukcesi en la vivo?", oni devus plene pravigi tiun kategorion de homoj.

Sed estas alia kialo pli komplika, nome ke la intelektula kaj la materialista mensoj ofte estas nedependaj de la socia aŭ profesia situacio. Tiun lastan faktan ni pli profunde ekzamenu.

Oni kutime dividas la homojn en du grupojn, unuflanke laboristojn, aliflanke intelektulojn. Laŭ tiu distingo ne manas laboranta homo laboras per la cerbo kaj estas do intelektulo. Sed manlaboristo bezonas cerbon, pripenson, inteligenton "motoran"; kaj ĉiu alia laboro ne nepre estas intelektula laboro. Estas memkompreneble, ke sinjoro, kiu la tutan tagon metas stampojn sur leterojn aŭ dokumentojn, ne faras intelektan laboron! Tamen li povas esti intelektulo, se li havas intelektan vivon ekster la profesio, sed la profesio mem nek postulas nek stimulas intelektulecon.



Mi konsideras kiel vere intelektajn nur tiujn profesiojn, kiuj ampleksas sciencan, artan aŭ literaturan agadon. Tiu vidpunkto estas diskutibla, kaj oni povas konsideri multajn aliajn profesiojn kiel intelektulajn, sed fakte la plejmulto da intelektuloj troviĝas inter sciencistoj, artistoj kaj literaturistoj. Tamen ankaŭ tiaj profesiuloj povas esti ne perfektaj intelektuloj, se ilia profesio estas nura profitilo kaj se ili miskonas la intelektan valoron de sia profesio.

Alia demando estas: "Ĉu sufiĉas koni ies profesion por decidi, ĉu li estas intelektulo aŭ ne?"

Plej ofte estas supozate, ke persono, kiu praktikas profesion "intelektulan", ankaŭ posedas intelektan spiritostaton kaj nepre malhavas praktikan materialistan menson. Aliflanke, praktikanto de iu ajn el la ceteraj profesioj estas ĝenerale konsiderata kiel nura materialisto, havanta nenion komunan kun intelektulo.

Por ke tiu opinio respondu al la realo, estus unualoke necese, ke ĉiu homo praktikus la profesion, por kiu li estas kreita, kiu estas konforma al liaj profundaj aspiroj. Plue estus bezonate ke la spirito de ĉiu individuo, anstataŭ esti aparta mondo, estus unutendenca, direktita al unu sola celo, en tiu ĉi okazo al la profesia kampo.

La unua kondiĉo ne ofte realiĝas, ĉar en nia socioformo la profesielekto plej ofte dependas de konvenecaj konsideroj, kiuj havas nenium rilaton al la personaj kapabloj (profesio kaj interrilatoj de la patro, ekonomia stato, medio kaj socia kategorio al kiuj apartenas la gepatroj). Estas vere, ke ekzistas kazoj, kie la elekto tute respondas al la menso de la elektinto, sed ili estas maloftaj, ĉar se oni akceptas, ke la elekto estas sendependa, la elektanto tamen devas plej ofte decidi en tre juna aĝo, kiam la veraĵ kapabloj nur escepte evidentiĝas en sia tuta amplekso. Sekve tiu decido estas, se ne gvidata, almenaŭ influata de plenkreskuloj ĉirkaŭ la junulo, liaj gepatroj, instruistoj ktp.

Sed ofte la elekto estas eĉ ne libera, kaj tiam ĝi estas difinita de materiaj, sociaj kaj aliaj faktoroj, kiuj estas ne dependaj de la personaj inklinoj.

Koncerne la duan kondiĉon (spiritostato direktita nur al profesia kampo), la homa menso estas vera mozaiko, ĉies spirito havas multoblajn aspektojn, kaj malfacile estas imagi individuon, kies temperamento estas nur funkcio de lia profesio.

Resume oni povas konkludi, ke la homo faras la profesion sed ne la profesio la homon, tamen ne perdante el vido, ke ĉiu individuo estas certagrade influata de sia profesia vivo, kaj pro sia agado en ĝi kaj pro la medioj, al kiuj li per ĝi interrilatas. Tiu influo estas des pli granda, ju pli la spirito de la homo respondas al la spirito de la profesio. Per kaj pro la praktiko de kiu ajn metio, ni ricevas specialajn karakterizaĵojn. Tiuj akiritaj ecoj povas favori aŭ malfavori intelektulecon, sed ili ne povas krei aŭ detrui ĝin. Nia esenca menso restas, kaj oni ne rajtas aserti, ke "kia estas la profesio, tute tia estas la homo".

Avertinte la leganton kontraŭ supraĵa juĝado komune esprimita de la mezaj homoj mi nun provos respondi la demandon: Kio estas intelektulo?

Por faciligi la komprenon de la respondo mi antaŭe respondos al alia demando pli simpla: Kio estas artisto? Por esti artisto estas du aferoj necesaj: unue *la talento*, kiu estas la favora spiritinklino al la artisteco, due *la arta edukado kaj formiĝo*, kiu ebligas la stimulado kaj disvastigon de tiu talento. Artisto do estas homo, kiu posedas artan talenton kaj kiu akiris la konforman formiĝon.

Same, por esti intelektulo estas necesaj du aferoj. Ili estas laŭ ordo de graveco: unue certa pensmaniero, natura spirita inklino, kiu estas atingebla (enirebla) de supra homa aktiveco, de la pli altaj kaj pli noblaj aspiroj de la homaro — due iu formiĝo aŭ prepariĝo, kiu ebligas la ekagadon kaj stimulon de la menciita spirita inklino.

Intelektulo do estas homo, kiu posedas intelektulan menson kaj akiris intelektulan kulturon. La menso estas la fekunda kampo, la formiĝo estas la konvena semado (kulturo) de tiu kampo. Persono, kiu plenumas ambaŭ kondiĉojn, estas perfekta intelektulo, kiu ajn estas lia profesio. Persono, kiu ne kunigas en si la du kvalitojn, kiu ajn estu lia profesio, ne estas komplementa intelektulo.



Intelektulo estas inteligenta homo, sed lia inteligento estas direktita ne al nur unu kampo sed al diversaj, prefere al pli altaj, superaj kampoj. Li tre multe pensas, ne nur pri la ĉiutagaj aferoj de la ordinara vivo sed ankaŭ pri problemoj sciencaj, sociaj, etikaj ktp., kiuj koncernas la tutan homaron.

Se ni memoras, ke intelektula formiĝo estas nomata "ĝenerala kulturo" (subkomprenite: de la spiritoj), ni povas nomi la intelektan menson "la ĝenerala natura fekundeco de la spirito".

Pro la nepre necesa formiĝo rezultas, ke oni fakte trovas multe pli da intelektuloj inter la superaj klasoj kaj profesioj, kie tia formiĝo preskaŭ ĉiam ĉeestas, ol inter la malsuperaj tavoloj, kie la akreco de la vivbatalo igas minimuma aŭ nenigas ĉian aperantan intelektan inklinon. De tio oni deduktas — nur tro facile! — ke ĉiuj personoj apartenantaj al la bonhavaj kategorioj nepre ĉiam estas intelektuloj. Se tiu dedukto estas tro frua, tio devenas de la fakto, ke en multaj kazoj mankas la unua, pli necesa kondiĉo, la spirita fekundeco. Mi diris, ke tiu kondiĉo estas la pli fundamenta el la du. Kial? Pro la simpla kaŭzo, ke oni povas kompletigi kulturon, sed estas neoble ŝanĝi menson. Same oni povas instrui arton, sed oni ne povas krei talenton.

El la dirita rezultas, ke ĉiu perfekta intelektulo estas kulturita homo, sed ĉiu kulturita homo ne nepre estas perfekta intelektulo. (Same, ĉiu perfekta pentristo lernis desegnadon, sed ĉiu homo, kiu lernis desegni, ne nepre estas perfekta pentristo.) Ni vidu nun, kio okazas, kiam mankas unu el la du elementoj de intelektuleco.

Se individuo ricevas solidan instruadon, li posedas ĝeneralan kulturon, t. e. li havas konojn, kiuj devas permesi al li kompreni kaj taksii la valoron kaj gravecon de la plej multaj intelektaj aparaĵoj kaj de la problemoj ligitaj al ili; foje li kapablas ilin eble sekvi aŭ partopreni. Sed se lia spiritostato tion kontraŭdiras, se li sentas neniun intereson aŭ admiron por tiaj aferoj, li restos indiferenta al ili. La ricevitaj semoj restos malfekundaj. Lia intelekta akiraĵo estos senfrukta, kaj li havos nenion komunan kun vera intelektulo. Se li praktikas interesan profesion, lia ribela spirito tamen estos limigita je

nura kaj simpla plenumo de tiu profesio, kaj neniam li perceptos tion, kio transe estas. Li estas nura praktikisto, specialisto, fakulo.

Sinjoro, kiu estras multajn oficistojn, granda funkeiulo, havas belegan situacion kaj estas estiminda homo. Mi supozas lin kulturito kaj lertega profitisto, kiu tute troviĝas en sia loko. Tiuj kvalitoj tamen ne sufiĉas por fari el li perfektan intelektulon, ĉar por tio li devas posedi ankaŭ intelektan menson. La kulturo ja estas stimulo kaj elvolvigilo sed ne kreilo de intelektuleco.

Male, persono, kiu havas spiritinstinkton favoran por intelekta vivo, sed kiu, pro limigaj cirkonstancoj, ne povis evolui tiudirekte, konservos ĉiam intelektan fundamenton, kiu montriĝas en nesatigebla deziro al perfektigo, kompreno, kono. Li faros sian ekstreman por kompensi sian kulturmancon, ekzemple legante literaturajn kaj didaktikajn verkojn, vizitante kursojn, prelegojn, koncertojn, muzcojn. Se la materia vivo malhelpas lin tiamaniere instrui sin, li serĉas kuneston kun pli instruitaj homoj, kaj li demandas ilin pri ĉiuspecaj problemoj, kiuj maltrankviligas lin. Tia instruiĝo estas por li bezono, kiun li ne kapablas malhavi. Interrilato kun tia homo tuj montras, ke malgraŭ sia manko en kulturo li posedas fekundan menson kaj profundan pripensemon, kiuj sin malkovras en ĉiam vekiganta sciemo por la aĵoj de la spirito.

Se ni komparas la du ĉi-supre priskribitajn individuojn, ni konstata, ke ĉe ambaŭ mankas elementoj por konsistigi perfektan intelektulon. Sed la lasta tipo, eble se estas necesaj penigaj klopodoj, kapablas atingi intelektulecon, dum la dua tipo neniam tion atingos. Same, homo sen talento, kiu nur studis arton, neniam fariĝos vera artisto.

Sed oni povas esti perfekta artisto ne estante perfekta intelektulo! Skulptarto kaj muziko estas intelektulaj, superaj aktivecoj. Sed se la talentplena muzikisto aŭ skulptisto krom sia speciala arta formiĝo havas nur supraĵan kulturon, kaj se li posedas neniun inklinon por interesiĝi pri alia intelekta temo krom sia propra arto, li eble estas kompleta artisto sed ne plena intelektulo. Lia konversacio povas dum limigita tempo ĉarmi nin, pro tio ke ni ŝatas iom kompreni lian arton kaj



liajn ideojn pri estetiko. Sed kiam li estos plurfoje preparolinta tiun temon, ni havos la impreson, ke ni aŭdis sufiĉe pri ĝi. Se ni tiam volas iom rigardi aliajn horizontojn, ni konstatas, ke ili estas al li nekonataj kaj ke li havas nenion por diri.

Nekompleta intelektulo estas ankaŭ tiu artisto aŭ sciencisto, kiu estas tro profitema kaj senbezone oferas sian arton aŭ sciencan al aĉeto. Ĉar memkompreneble estas, kaj tio tute nature devenas de la priskribo, kiun mi faris de la intelektula tipo, ke lia spiritostato estas nekordigebla kun aĉa komercemo. Sed tio ne signifas, ke intelektulo devas esti nur simpla revulo, senigita de ĉia praktika saĝo. Li povas esti realisto, sed ne materialisto. Antaŭ ĉio li ne rajtas malutili al sia arto aŭ scienco por gajni pli da mono.

Universitatanoj kiel inĝenieroj, kuracistoj ktp., kies penigaj studoj kaj grava profesia praktiko postulas grandajn cerbo-kapablojn, devas posedi grandan intelektulan pensforton, kaj pri ili oni prave supozas, ke ili estas veraj intelektuloj. Tamen oni trovas inter ili same kiel inter artistoj, literaturistoj, komponistoj, ĵurnalistoj, personojn, kiuj preterlasas neniun okazon por fari de siaj aktivecoj vastan komercan ekspluatadon kaj pri kiuj oni rajtas vere diri, ke ili havas naturan negocotalenton. Ili rigardas sian interesan profesion ne nur kiel vivrimedon sed eĉ kiel profitilon, pliriĉigilon, kaj tute pretervidas ĝian intelektan valoron. Tiel agante ili malindigas sin mem kaj sian profesion.

Ĉi tie oni tamen devas fari distingon. Se intelektulo, pro malfeliĉaj cirkonstancoj, estas devigata konsideri sian aktivecon kiel nuran vivrimedon, li ja tute senkulpe malutilas al sia arto aŭ scienco, kaj li kontraŭvole malhelpas la elvolviĝon de sia intelektuleco pro manko de praktiko kaj plua studado. Sed kvankam li ne plu povas perfekte ĝi aŭ evolui, li konservas sian esencan intelektan naturon. La materia vivo ne povas forigi tiun spiriton. Sufiĉas iu plibonigo de la vivcirkonstancoj, por ke tia persono revenu al vera intelekta vivo.

Sed aliaj intelektuloj, kiuj senbezone kaj propravole komercigas sian profesion, miskonante ĝian veran rolon, nur kun la celo pliriĉigi sin, estas veraj materialistoj kaj ne posedas la absolutan intelektan menson.

Industrio kaj komercio estas materiaj praktikoj antaŭ ĉio, kaj memkompreneble oni emas rigardi ĝiajn profesiulojn kiel nurajn materialistojn. Tamen oni en tiuj kampoj renkontas personojn, kiuj ne nur posedas belan kulturon sed ankaŭ universalan spiriton, malfermitan al superaj aferoj. Ĉar tiu inklino ne trovas kontentigon en ilia profesia vivo, ĝi montras sin ekster ĝi per legado, studado aŭ arta aŭ scienca aktiveco.

Por eviti ĉian miskomprenon: oni tamen ne supozu, ke mi faris tiun ĉi analizon por veni al la absurda konkludo, ke universitatano aŭ artisto ne estas intelektuloj, dum komercisto aŭ metiisto estas tiaj! Tio estus eraro multe pli grava ol tiu, kiun mi volas korekti. Mi tutsimple provis difini la intelektulan menson kaj samtempe montri, ke laŭ intelektula vidpunkto, la homo ne necese estas tia, kiel ŝajnas indiki lia profesio, kaj ke por distingi intelektulon de neintelektulo tute ne sufiĉas, kelkfoje estas eĉ erarige, lin prijuĝi laŭ lia profesio.

Mallonge: idealismo kaj intelektuleco unuflanke, realismo kaj materialismo aliflanke ne estas metioj; ili estas ekzistokvalitoj, mensaj tipoj, *aspektoj de la personeco*.

## La fundamento de la vivo

*Naturleĝo — Razonleĝo — Moralleĝo.*

Ekstraktis kaj tradukis **B. Rijpstra**, laŭ radioparolado de prof. jur. dro Leo Polak, antaŭe prof. de filozofio en Nederlando, mortinta 1941 en koncentrejo.

Kion la mondo bezonas, tio estas: konstanta, netuŝebla sensanĝa fundamento, sur kiu ĝi povas bazi kaj konstrui; do: por ĉiuj homoj certeco ĉie kaj eterne valida.

La religioj, milfoje ŝanĝiĝantaj, kun siaj eternaj kvercloj kaj duboj, malraciaj dogmoj, nefidindaj, kontraŭaj kaj falsitaj skribaĵoj povas neniam doni tiun konstantecon kaj certecon.



Tia fundamento povas esti nur: la eterne senŝanĝa, principe ne eraripova kriterio (normo) pri vero kaj morala valoro en ni mem kiel estuloj logike pensantaj, morale sentantaj, juĝantaj kaj elektantaj, do spirite vivantaj estuloj.

*Naturleĝo* estas principo (fundamenta ideo) de la naturscienco.

*Rezonleĝo* estas principo de la logiko.

*Moralleĝo* estas principo de la etiko (moralscienco).

En tiuj kampoj same validas senŝanĝaj, eternaj, universalaj leĝoj, kiuj ebligas kaj klarigas la naturfenomenojn, la logikan pensadon kaj la moralajn distingon kaj elekton. Tiuj leĝoj havas nenion komunan kun ordonoj aŭ komandoj en la senco de juraj leĝoj aŭ skribaj ordonoj; kontraŭe ili pro sia konstanteco ekskluzivas ĉian eblon de diaj aŭ homaj volo kaj arbitro.

La teologia sofismo diras: — Leĝo inkluzivas leĝodonanton; viaj leĝoj do pruvas la ekziston de dio. — Kial estas tio trompa sofismo? Ĉar la ideo "leĝo" estas dusenca. 1. Leĝo povas esti ordono, kiun oni povas doni kaj nuligi, obei kaj malobei. 2. Leĝo povas esti ĝenerala, universala, do senescepta *regulo* de la okazado aŭ konstanta *rilato* inter nekonstantaĵoj.

Nur leĝo en la senco de ordono (sub 1.) inkluzivas leĝodoninton (validas ekz. por jura leĝo, ŝtata leĝo); ĝi formulas la volon, ordonon aŭ malpermeson de la leĝodoninto.

Sed leĝo en la dua senco (ĝenerala regulo aŭ konstanta interrilato) havas nenion komunan kun iu ajn ordono aŭ ordonanto, eĉ ekskluzivas tion, ĉar la konstanta, senŝanĝa esenco malebligas ĉiun ŝanĝon, ĉian eblon de arbitro kaj neobco.

## I.

*Naturleĝo* estas universala regulo pri la naturokazado kaj formulas: ĉie kaj ĉiam, post plenumo de specialaj (difinitaj) kondiĉoj aperas aŭ ne aperas specialaj (difinitaj) naturfenomenoj (kemiaj leĝoj, leĝo de Newton pri la gravito, leĝo de lumo ktp.).

Naturleĝo neniam signifas ordono aŭ komando al la gasoj, lumradioj, atomoj, elektronoj ktp., ke ili konduku iel aŭ tiel. Ĝi esprimas nur la senŝanĝan esencon, la propran econ de la naturaĵoj, naturelementoj, naturfortoj, pro kio ili nepre kondukas tiel kaj ne alie, agas, reagis.

Ĉiu naturleĝo baziĝas nur sur la principo de kaŭzo kaj efiko. Ĉiu naturokazo estas kaŭze difinita, do necesa; neniuj devio estas ebla. Lumo eterne kondukas kiel lumo (laŭ variaj cirkonstancoj), akvo kiel akvo, gaso kiel gaso, elektrono kiel elektrono, energikvanto kiel energikvanto. Kaj en tio estas nenio ordonebla aŭ malpermesbla. Kontraŭe: ĝi malebligas (en la senco de senkaŭzeco) ĉian kontraŭnaturan "miraklon" aŭ "hazardon". Nenio perdiĝas, io ne estiĝas el nenio.

Sur tio baziĝas la tuta naturscienco, kiu ne kulpas pri tio, ke bedaŭrige blindigita, milpece disŝirita homaro ne pli bone "scias" apliki ĝiajn benojn kaj geniajn eltrovojn kaj malkovrojn.

## II.

*Rezonleĝo* estas ankaŭ ne ordono sed ĝenerala regulo de la rezonado (juĝi kaj konkludi, do fari logikajn konkludojn); ĝi signifas por ĉiuj homoj ĉiam validan kriterion (normon) por distingi inter logika kaj nelogika, inter vera kaj nevera.

Se  $2 \times 2$  estas 4, ĝi estas 4 por ni ĉiuj kaj ne 3 aŭ 5. Kiam ni juĝas, ni jesas aŭ neas. Ekz: Hodiaŭ estas lundo, aŭ hodiaŭ ne estas mardo. Kiam ni jesas iun veron (hodiaŭ estas lundo), ni celas diri, ke la neo (hodiaŭ estas ne lundo), estas ne vera. Kaj se neo estas vera (estas ne mardo), tiuokaze la jeso (estas mardo) estas ne vera. Ne ambaŭ povas esti samtempe veraj, nur unu. Tria eblo ne ekzistas.

Jen la tuta pensoleĝo, la duparta rezonleĝo: ĉie kaj ĉiam jeso kaj neo kiel kontraŭoj ekskluzivas unu la alian. Sen tiu regulo ni povus neniam fari eĉ unu logikan konkludon. Mi diras ekz.:

- a. ĉiuj planedoj rondiras ĉirkaŭ la suno,
  - b. la tero estas planedo,
- kaj konkludas:
- c. ankaŭ la tero do rondiras ĉirkaŭ la suno.



Komprenoble! vi diras. Jes, dank' al nia rezonleĝo. Atomoj, elektronoj, gasoj ktp. ne bezonas studi fizikon por kondukti laŭ la naturleĝoj de elekto, kemio, mekaniko. Same ni ne bezonas studi logikon por apliki ĝuste la rezonleĝon; ni faras tion jam nekonscie. "Konduku laŭ la naturleĝoj!" estus senseca ordono, same: "Pensu laŭ la pensoleĝo!" Ĉar ne dependas de ies volo aŭ arbitro, sed de la eterne sensanĝa, konstanta propreco (esenco) de la rezonkapablo, al kiu ne povas ne submetiĝi kia ajn rezonado.

Eĉ "ĉiopova dio" ne povas fari, ke vero kaj nevero, jeso kaj neo, ne ekskluzivas unu la alian; li ankaŭ ne kapablas fari, ke  $2 \times 2$  ne eterne estas 4.

La tuta aritmetiko same kiel algebro baziĝas sur la logiko.

Ĉiu t. n. sankta skribo, kiu enhavas kontraŭdirojn, pro tio enhavas same multe da neveroj kaj per tio refutas sin mem kaj montriĝas stulta, nefidinda homa laboraĵo. Ĉiuj religiaj doktrinoj, kiuj enhavas kontraŭojn (la triunuo ktp.) estas kontraŭveraj teologiaj elpensadoj, kiujn la buŝo povas konfesi sed la logika penso ne akcepti.

### III.

*Moralleĝo* estas la fundamento de la moralo, la fonto de nia scio pri bono kaj malbono. Ĝis nun regas la fundamenta craro rilate al moralo, ke la sciofonto (*moralleĝo*) troviĝas en la volo, la ordono, la komando de supera potenco, de leĝodonanto. Ke tio ne estas ebla, pravas jam la simpla konsidero, ke ni devas obei nur iun bonan (sanktan) potencon sed ne iun malbonan (diablan) ordonanton. Sed por tion fari ni devas posedi scion pri bono kaj malbono por scii, kiu potenco estas bona, kiujn ordonojn oni devas obei. Do: la scio mem ne povas baziĝi sur ordono sed devas *antaŭiri* ĉian postulatan obeon.

*Moralleĝo* estas la ĝenerala, sensanĝa, konstanta regulo, laŭ kiu ni morale aprobas, distingas kaj juĝas pri bono kaj malbono, nobla kaj malnobla, estiminda kaj malestiminda. La *moralleĝo* enhavas nian propran eternan sensanĝan normon pri bona kaj malbona. Certe, nekonstanta kaj variema estas la juĝo pri faro kaj nefaro, pri la *konduco* de la homoj. Sed

per tio ni tuŝas nur la surfacon. Ni devas penetri pli profunden por trovi la veran terenon kaj objekton de la morala laŭdo aŭ mallaŭdo, de bono kaj malbono. La morala kriterio ne koncernas la eksteran faron aŭ nefaron, ne la ŝajnon sed la esencan, la inklinon, la volon, la karakteron, la motivon, el kiu fontas la konduto (ago). Pro tio ni juĝas farojn ekstere samajn nesamaj. Ekz: Ĉu sinmortigo estas nobla aŭ malnobla? La demando — sen la vorto pli — estas senseca, car ĝi estas netuŝebla de morala juĝo. Sinmortigo povas esti malestiminda, malkuraĝa forkuro el la vivo (Hitler); ĝi povas esti ankaŭ impona, heroa sinofero por savi aliajn aŭ pro fideleco al koncepto pri vero kaj hono. (Giordano Bruno, la herezulo panteista, kiu lasis sin mortigi pro amo al la vero, sen espero kaj sen timo).

Ne kia konduto sed kia inklino (emo, motivo) estas nobla aŭ malnobla, jen por kio validas la sola eterna *moralleĝo*, la normo, kiun ni ĉiuj komune posedas kaj laŭ kiu estas bona ekz. la amoriĉa, verama inklino, kaj malbona malhonesto, malkuraĝo, kruelo, vanto, subaĉetemo ktp.

Kial ĉiuj virtoj estas bonaj kaj ĉiuj malvirtoj malbonaj? La respondo kondukas nin al la antikva formulo de judoj, kristanoj, ĉinoj, budhistoj: Amu aliulon kiom vin mem! — Aŭ: Malbona estas la egocentra (mi-ama) subjektiva inklino, bona la objektiva inklino. — Aŭ: Kion ajn, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, ankaŭ vi faru al ili. Tio estas la fundamenta regulo de ĉiu moralo, ĉe judoj, kristanoj, ĉinoj, budhistoj.

Kaj jen la profunda senco de la sentenco, kiu nuligas ĉian ordonmoralon: Amo (kiu ja ne estas ordonebla) estas la plenumo de la leĝo.

La morala devo al faro aŭ nefaro do tute ne signifas, ke la konduton ordonas al ni iu supernatura (eksterhoma) potenco, minacante per malfavoro, sed simple, ke la pura inklino-moralo staras rekte kontraŭ ĉiu ordonmoralo, kiu dum jar-miloj malklarigis kaj degenerigis la etikon. Nek la kriterio pri bono kaj malbono, nek karaktero aŭ inklino (t. e. propra interna libera prefero) estas ordonebla. Nek dio nek ordono



influas en tio, kiel jam diris la fama juristo (kaj teologo) Hugo Grotius: Same kiel dio neeble povas fari, ke  $2 \times 2$  ne estas 4, tiel li ankaŭ ne povas fari, ke tio, kio laŭ morala kriterio estas esence malbona aŭ bona povas esti *ne* malbona aŭ *ne* bona.

Nia propra logika kriterio morala juĝas, elektas, konkludas. Logika eterne restas logika, nigra restas nigra kaj honesto bona kaj eĉ plej pia trompo malbona.

La etika kriterio ne dependas de ies ordono aŭ propra volo aŭ arbitro sed baziĝas sur la sensanĝa, propra esenco, la propra leĝeco, la aŭtonomio de nia morala distingokapablo kaj elekto-kapablo, nia etika "racio".

Kie ni trovas la leĝon de bono kaj malbono, por ni ĉiuj ĉiam kaj ĉie valida? Nur en nia interna sperto, en nia propra intuicio, morala sento, morala juĝo. Nenio en la mondo krom en ni mem estas la fonto de nia scio pri bono kaj malbono. Nek supernatura (eksterhoma) revelacio, nek dio, nek homo, nek skribo, nek ekzemplo, nek aŭtoritato povas instrui al ni distingi inter ruĝa kaj blua, logika kaj nelogika, nobla kaj malnobla, sed nur nia propra kolorsento kun sia propra leĝa reago, nia propra rezonkapablo kun sia propra rezonleĝo, nia propra elektopovo kun sia propra moralleĝo.

Kvankam ekzistas mil kristanaj, judaj, budhistaj ordonoj — ne ekzistas kristana aŭ juda aŭ budhista moralleĝo, same kiel ne ekzistas tia pensoleĝo nek tia naturleĝo.

Ĉiuj religioj ĉerpas siajn raciajn kaj moralajn elementojn (do sian eterne valoran *parton*) el nia sola senreligia racileĝo, el nia sola senreligia moralleĝo. Kaj kie religio devias de tio, kontraŭas al tio, tie religio estas neracia, nemorala, do forĵetinda.

Ĉiu religia ordonmoralo kun sia puna kaj rekompensa "post-morto" estas malpurigo de la pura inklinmoralo pro parte ekstermoralaj, parte eĉ malmoralaj religiaj dogmoj, kiuj tendencas al egoisma motivigo pro timo aŭ espero, motivoj kiuj metas eĉ la abnegacion mem en la servon de egoismo kaj senbriligas ĉiun oferon per atendo de milobla, *ne*, senfina

profito. Pri tiuj dogmoj aludis Emanuel Kant dirante: La morto de la dogmoj estas la naskiĝo de la moralo.

Por kreduloj same kiel por liberpensuloj validas:

unu kaj sama eterna naturleĝo,  
unu kaj sama eterna rezonleĝo,  
unu kaj sama eterna moralleĝo,

kaj ĉiu el ili en sia kampo ekskluzivas ĉian eblon de kreo aŭ neniigo, ordono aŭ arbitro.

Ne skueblaj kaj ne tuŝeblaj staras la naturleĝo, rezonleĝo kaj moralleĝo, super ĉia ŝanĝiĝo laŭ tempo kaj loko, validaj por ĉiu homo, ĉie kaj ĉiam, brilante en la lumo de eterno.

**Redakcia rimarkigo.** Mi supozas, ke la supra artikolo kaŭzos kaj aplaŭdojn kaj protestojn. MR volonte donos lokon al komentoj. Mi ĝojus se ili, egale de kiu flanko ili venos, estus ne disputaj sed diskutaj, celante ne asertadon sed serĉadon de vero, de komuna pli bona kompreno. Kredantoj kaj nekredantoj ofte suspektas kaj malŝatas unu la alian same forte kiel anoj de kontraŭaj ekstremaj politikaj kredoj. Disputado kaj asertado fariĝas ĉefafero, la homojn mem kaj ilian vivon oni forĝasas. — En Hindujo ekzistis (ĉu ankoraŭ ekzistas mi ne scias) religia sekto ateista. Ĝi ne havis proprajn templojn, sed ĝiaj anoj, same kiel ĉiuj homoj, rajtis libere eniri en la templojn de aliaj religiaj frakcioj kaj paroladi tie. Se ni povos tiel renkonti kaj akcepti unu la alian, sincere, kun veramo kaj interkompreno kiel sola celo, ni ĉiuj certe gajnos de tio. — La vorton budaismo en la manuskripto mi anstataŭigis per budhismo. Ĉar la origina vorto estas Budho (kun cirkolata h) apenaŭ estas kaŭzo uzi alian formon en esperanto. S. E.

## H. N. Bjalik

Haim Naĥman Bjalik (1873—1934) estas la plej granda poeto de la lasta periodo de la hebrea lingvo. Li naskiĝis en urbeto en Ukrainio. De 1924 li vivis en Tel-Aviv en Palestino kaj mortis en Vieno post serioza operacio.

Lia antaŭulo — la plej granda hebrea poeto de la antaŭa generacio — plendis, ke li estas la lasta poeto de lingvo jam



forĝesata kaj nekomprenebla. Sed la apero de Ĥ. N. Bjalik kaŭzis renaskiĝon de la hebrolingva literaturo, estigis grand-skalan socikulturajn movadojn por revivigo de la biblihebrea lingvo, kiu ĝis tiam vivis sole en liturgia kaj ritoj.

En siaj lirikaĵoj kaj grandaj poemoj vokis Bjalik sian dissemitan popolon al reakiro de ĝia frakasita kaj perditita homa digno, vekis ĝian nacian konscion kaj vokis ĝin al vasta sendependa spirita vivo, bazita sur malnova altmorala tradicio. Li vokis sian popolon al streĉa pionira koloniigo de ĝia antikva patrujo kaj batalis kontraŭ asimiliĝaj tendencoj en la juda socia vivo.

Li estis poeto de neordinara esprimpotenco kaj vivis en siaj tondrosimilaj "jeremiadoj" (imitante la bibliajn profetojn) la malvirtojn de sia generacio. Li amare lamentis pri la mizera stato de sia subpremita kaj persekutata popolo, konsolis ĝin per siaj majestaj, altpatosaj profetvizioj.

La influo de Bjalik estis tre sekvoriĉa. Ĝi akcelis la renoviĝon de la hebrea lingvo, kontribuis al ĝia vortuzo kaj stila konformiĝo al la postuloj de novaj tempoj, kaŭzis rapidan kreskon en ĉiuj branĉoj de la hebrea literaturo, kies nuna florado ne estas imagebla sen la literatura agado de Bjalik.

Li estis la plej granda poeto de la lasta epoko, brila beltristo, publicisto kaj kritikisto, li reformis la literaturan stilon, popularigis talmudajn legendojn (li kompilis kompletan talmudan parabolokolekton) kaj mezepokajn hebreajn poetojn, estis brila tradukanto (i. a. de Don Kihote kaj Wilhelm Tell). Tial li laŭmerite estis konsiderata kiel spirita gvidanto de sia popolo.

Verkoj de Bjalik estas tradukitaj en pli ol dudek lingvojn; plej bonaj estas tiuj en la rusa kaj la itala, faritaj de V. Jabotinski. La sekvanta traduko estas la unua provo prezenti la poeton en esperanto.

En "Kiam tro longaj tede pasos ĉiuj tagoj" li batalas kontraŭ vulgara ordinareco de malindigita, dignomanka, banala vivo, senvalora sen altmorala idealo, kiu sola povas alporti la savon. Kiel antikvastila profeto Bjalik pensas kaj parolas en bibliaj formoj kaj uzas konceptojn de la antikva vivmaniero

(ekz. tendo anstataŭ domo). Parolante pri la konstanteco de naturaperaĵoj, li diras, ke la maro ne forkuris kaj Jordano ne ekfluis returne; tiu esprimo rilatas al la biblia teksto:

"La maro vidis kaj forkuris,  
Jordan' turniĝis malantaŭen". (Psalmaro, 114.)

Siajn ideojn pri savo de la homaro el idealmanka vulgareco li esprimas en formo de revo pri alveno de Mesio. Temas tie ĉi ne speciale pri liberiĝo de lia propra popolo el katenoj de subpremo kaj rajtomanko sed pri tutmonda liberiĝo el viv-banaleco sen vivopraviga idealo.

Lia vivosorto estis bonŝanca: li mortis en 1934 kaj ne travivis la plej ampleksan ekstermbuĉadon de sia popolo ...

J. Kohen-Cedek,  
Jerusalem.

## Kiam tro longaj tede pasos ĉiuj tagoj ...

De H. N. BJALIK

(El vizioj de la lastaj profetoj)

... Kaj tiel, kiam  
tro longaj tede pasos ĉiuj tagoj,  
similaj tute unu al alia  
kaj samaspektaj, morgaŭ kiel nuno,  
sen guto da kontent' sed multezorgaj —  
envenos tiam en dezertan vivon,  
atakos homon, beston — la Enuo.  
Kaj dum krepusk' eliros laca homo  
al mara bord' promeni kaj konstatos:  
la mar' troviĝas tie, ne forkuris —  
kaj li oscedos.  
Ĉielen la rigardon levos homo,  
al Oriono, kaj al la Plejadoj:



en sia loko estas ĉiu stelo —  
kaj li oscedos.  
Tedataj sidos kune hom' kaj besto,  
tro peza estos vivoŝarĝ' al ili,  
kaj ambaŭ senhariĝos pro Enuo:  
defalos bukloj, kaj la kap' kalviĝos,  
forvelkos griza lipharar' de kato.

La mondon ekpenetros la Sopiĝo.  
Ĝi per si mem aperos same kiel  
aperos ŝim' fetora kun fungetoj  
en traputrinta arbkavaĵo.  
Plenigos la sopiro ĉiujn truojn  
en faldoj kaj ĉifonoj de Mizero.

Okazos tiam —  
revenos homo dum la sunsubiro  
al sia tendo vespermanĝi;  
ĉirkaŭmorditan haringoston trempos  
kun panokrusto en vinagron —  
kaj eksopiros.

Eksorbos unu guton malvarmetan  
de malserena fluidaĵ' el glaso —  
kaj eksopiros.  
Demetos ŝuojn, ŝvitoplajn ŝtrumpojn  
por nokta dormo en kuŝjangulo —  
kaj eksopiros.

Ambaŭ, hom' kaj besto  
sopiros kune tra la nigra nokto:  
la hom' en sonĝaj ĝemoj kaj ekkrioj —  
kun unogratoj sur tegmento lada  
kaj kun ĝemsonoj la malĉasta kato.

Kaj tiam venos fine la Malsato,  
malsato plejpotenca, admirinda,  
neniam estis tia en la mondo,  
malsato ne pri pano kaj spektakloj  
sed pri la veno de Mesio.

Kaj estos tiam —

en frumateno, antaŭ sunekbrilo,  
en la angul' malluma de la tendo  
sin levos ĉiu hom' el sia lito  
pro dormomanko laca sed tro sata  
de sonĝinkuboj, kun anim' malplena;  
ankoraŭ pendas aranefadenoj  
fiksitaĵoj al la haroj de l' okuloj,  
malpuraj pro turmentaj noktaj sonĝoj.  
Pro tim' ankoraŭ tremos la animo,  
ankoraŭ katmiaŭ, unogratoj  
borgrincos en la cerbo, sed li kuros  
al la fenestro por ĝin viŝi pura  
aŭ kuros al la sojlo, kaj ŝirmante  
per mano la rigardon malserenan  
kaj febran sed pri Savo avidegan,  
li la mallarĝan vojon pririgardos  
malantaŭ la barilo de l' dometo.  
serĉante la Mesion!

Kaj ekvekiĝos sub la litkovrilo  
virino laca, hirta, forvelkinta,  
premita korpe kaj animpremita  
ŝi de infana buŝo tiros sian  
elsekigintan mamon kaj aŭskultos  
atente: eble venas la Mesio?  
Aŭdebla estas ronko jam de lia  
neĝblanka azenino?  
Infana kapo el lulil' sin levos,  
el sia tru' scivole muŝo flaros:  
ĉu venas la Mesio? Ĉu jam tintas  
la sonoril' de lia azenino?  
La servistin' blovanta sur la fajron  
en forno la vizaĝon fulgonigran  
elŝovos tra la pordo por rigardi,



ĉu eble venas la Mesio,  
ĉu estas jam aŭdebla tondra voĉo,  
triumftrumpeta voĉ' de Savproklamo?...

El la hebrea de  
*J. Kohen-Cedek.*

## Voĉoj diverslandaj

### El Hamburgo

21. 3. 1947.

Jam tre ofte mi intencis sendi al vi raporton pri la vivado ĉi tie; sed ĉiam mi prokrastis ĝin, ĉar mi esperis, ke ju pli malfrue mi raportos, des pli da kaŭzo mi havos por ne nur lamenti, sed ankaŭ diri ion ĝojigan aŭ almenaŭ kontentigan.

Tiu ĉi espero bedaŭrinde ne plenumiĝis, ĉar la cirkonstancoj ne pliboniĝis. Eĉ kontraŭe, la mizero kreskas, kaj tial eble estus plej bone silenti. Ni bone scias, ke la nacismo, kin bedaŭrinde kreskis sur germana tero, kaŭzis mizeregon kaj mortadon en ĉiuj landoj de ĝi tuŝitaj kaj ke pro tio ni ne rajtas plendi pri tio, kio okazadas nun al ni. Sed parolante kun gesamideanoj, pri kies bona kunsento ni estas certaj kaj kiuj scias, ke la germanaj esperantistoj ĝenerale estis ĉiam kontraŭhitleraj, ni tamen cedas al la tento, eldiri tion, kio nin premas kaj faras nian vivon preskaŭ netolerebla.

La vintro, kiu nun — espereble — fine finiĝas, estis tiom kruela, ke preskaŭ ĉiu el ni miras, ke li aŭ ŝi transvivis ĝin. Mankis karbo kaj alia brulaĵo, mankis grenproduktoj, mankis gaso, mankis elektra fluo, trafikrimedoj ne funkciis, mankis pano. Ne ĉio mankis samtempe; sed tre ofte multaj malbonoj samtempe turmentis nin. La granda manko de ĉio (ankaŭ vestaĵoj, ŝtrumpoj kaj ĉiaj kuirejaj iloj) kompreneble kaŭzis malfortiĝon kontraŭ la tento de ŝtelado kaj rabado, kaj la publika sekureco troviĝas nun sur tre malalta nivelo. Estas danĝere iri sola el la domo vespere; ne nur virinoj kaj in-

fanoj estis atakataj kaj devigataj fordoni siajn saketojn, vestaĵojn, eĉ estis mortigataj nur pro la vestaĵoj: ankaŭ plenaĝaj viroj rifuĝis preskaŭ nudaj en la policejon, ĉar oni senkonsciigis ilin per bato kaj rabis de ili ĉiujn vestaĵojn, horloĝojn kaj aliajn objektojn. Karboj por civiluloj estas haveblaj nur per ŝtelo aŭ en la "nigra merkato", kaj tial tia ŝtelo tute ĝenerale ne estas plu konsiderata kiel peko. "Mi ja devas vivi", estas la kutimiro, kaj neniuj estas tiom cinika kiom la prusa reĝo Frederiko II, kiu al tiu diro donis la respondon: Je n'en vois pas la nécessité (Mi tion ne konsideras necesa; nome: ke vi vivu).

En la oficejo de mia firmo, tute ne hejtebla, ĉar aranĝita por centra hejtado, kiu ne funkcias, la interna temperaturo malaltiĝas ĝis minus 7 gradoj. La inko glaciĝis, kaj estis tute necble sidi tie kaj labori. Ekzistas improvizita forneto; sed mankas brulaĵo, kaj la tuboj estas plenŝtopitaj kaj ne purigeblaj. Kaj hejme oni sidas kun manteloj en la ĉambro, la sola ĉambro loĝebla; ĉar pro la multaj rifuĝintoj ni vivas kunpremitaj en mallarĝa spaco. Kiu ne fumus, ŝanĝas siajn cigaredojn kontraŭ necesaj okazoj haveblaj: pano, faruno, brulaĵo k. t. p. De kie tiuj bonaĵoj venas, ĉu ili estas ŝtelitaj aŭ donitaj de parencoj en la kamparo aŭ per ŝanĝo akiritaj de kamparanoj, pri tio oni ne faras demandojn. Iuj vojoj ĉiam ekzistas por multaj, kaj tial kelkaj kamentuboj fumus, kaj ĉiu scias iun lokon, kie eble por momento li povas ĝui iomete da varmo.

La malbona afero estas, ke krom la necesaj vivrimedoj ne estas produktataj varoj necesaj, kaj tial la mizero ne povas finiĝi dum longa tempo ankoraŭ. Mankas karbo ankaŭ por la plej multaj industrioj, mankas al ili ankaŭ krudmaterialo kaj elektra fluo. La komerco do malkreskis ĝis minimumo, kaj la personoj — krom tiuj, kiuj komercas kaŝe en la nigra merkato — elspezas sian lastan ŝparaĵon, por resti vivantaj.

Sed la esperantistoj tamen laboras. Kursoj funkcias konstante, kaj estas mirinde, ke instruisto kaj lernantoj en la malvarmega lerneja ĉambro studas diligente kaj kontentigas almenaŭ la intelektan malsaton. Mankas varbiloj,



lernolibroj, vortaroj pro manko de papero en la Brita Zono. Sub tiu manko suferadas ne nur nia Esperanta movado sed ĉiuj kulturmovadoj.

Ni sopiras al pli "normala" epoko, kvankam ni scias, ke pro la valoroj detruitaj ni neniam revidos cirkonstancojn, kiuj estis kutimaj antaŭ dekoj da jaroj. La granda publiko, kiu dum la longa vicostarado antaŭ butikoj kaj administrejoj havas sufiĉe da okazo por aŭdigi sian voĉon, kompreneble ne vidas la veran kaŭzon de la mizero, la nacismon, sed kulpigas nunajn regantojn pri tio, kio okazas. Ni devas klopodi, por ke ĉiu komprenu, ke nur internacia organizo, frata sento de homoj al homoj, larĝvida menso povas forigi la sekvojn de la krimoj faritaj kaj konduki nin al pli luma estonteco. En tiu direkto, tion oni iom post iom komprenas, iras nia Esperantomovado.

*Oscar Bünemann.*

## El Palestino

Haifa 15. 3. 1947.

En Svisujo vivas harmonie tri diversaj popoloj. Iliaj diversaj lingvoj estas parolataj libere, memkompreneble.

En Palestino ne estas tiel. Vivas tie ĉi turkoj, francoj, judoj, armenoj, araboj, asiroj, siroj, ĝebeledruzoj, germanoj, angloj. Ŝakaloj de diversaj rasoj atakas la landon, hienoj ĉi tie trovas nutraĵon.

Jen sankta lando, kie ĉiuj pretendas esti religiemaj, fakte tamen unu volas vidi la alian morta! Nuntempe aperis nova hiena speco: la terorista. Ĝi konas neniujn limojn, ĝi lernis ĉe la "Big 3" (la tri grandaj: Mussolini, Hitler, Franko) kaj estas fidela lernanto.

En 1936 la araboj, financitaj de la germanaj petrolebriuloj, komencis siajn atakojn kontraŭ angloj kaj judoj. Tio finiĝis ĉe la rando de ĉi tiu ĵus kvazaŭfinita milito. La judoj helpis

al la angloj ĉesigi la "ribelon". Dum la milito pli al 30.000 judoj soldatiĝis en tiu ĉi sankta landeto de duonmilionna loĝantaro. Kia eksterordinara proporcio! La judoj — kaj la regantaj potencoj — bone estis informitaj pri la faŝista ekstermado de judoj. La palestinaj judoj batalis sur ĉiuj frontoj por la angloj.

Multegaj ricevis medalojn. Ili volis ricevi nur siajn fratojn el la murdfabrikejoj; ili ricevis medalojn. Multaj inter la ekssoldatoj lernis la metion de teroro ĉe la militarismo; simpla kalkulo, sed nun la instruisto malamegas la bonan lernanton.

Tiu ĉi lando estis nomata Erec Izrael — Lando de Izrael — antaŭ ol invadis ĝin la nomitaj najbaroj. La judoj mem kulpas, ke ili ne havas patrujon eĉ en sia propra patrujo: Kial ili ne estis aŭ estas pli fortaj ol la aliaj. Ke Palestino vivas sub teroro ne estas novaĵo; la biblia vorto rakontas pri la sama afero; nenio nova sub la suno ... kion la romanoj tradukis latinen.

Jam la biblio abundas de sopiroj, teroro, sango; sopiroj pri forigo de la teroro de la hejmaj kaj fremdaj teroristoj. La judoj estas subpremataj de kvin mil jaroj. Ili donis al la mondo la plej belajn fabelojn pri homeco, homaranismo, ili donis profetojn, naciajn, religiajn, antinaciajn kaj antireligiajn: Moseon, Jesuon, Gustav Landauer kaj Karl Marx. Ĉiuj modernaj profetoj lernis el la Malnova Testamento, bone aŭ malbone.

La judoj ekipis la homaron per revoj kaj same per modernaj celadoj, sed la rekompenco ne estas ĝojiga. La judoj ricevos hejmon nur tiam, kiam la homaro hejmos en bonkoreco, en sennacia frateco.

En Palestino fluas la sango de la judoj. Judoj forkuras el Eŭropo, kie ili perdis siajn hejmojn. Ili venas "hejmen" neleĝe, oni kaptas la ŝipojn, resendas ilin sur insulojn... Kaj tiuj judoj helpis kontraŭbatali faŝismon — ŝajnas ke la demokratio amas faŝismon.

*Y. Armony.*



## El Hindujo

New Delhi la 22an de apr. 1947.

Eble vi legis ion pri la Azia konferenco, kiu okazis tie ĉi en New Delhi 2—5 de tiu ĉi monato? Parte pro scivol-emo, parte pro intereso por la mondparto, kiu estis mia "hejmo" dum iom da tempo, ankaŭ mi ĉeestis la tri publikajn kunsidojn de la konferenco. Tio estis sceno kaj okazo, kiujn mi neniam forgesos. Valoris iri eĉ se nur por rigardi la kolor-plenajn delegitarojn el landoj de Egiptujo ĝis Koreo kaj de Tibeto ĝis Aŭstralio, kaj ankaŭ por aŭskulti paroladojn kaj prelegojn de homoj multe priparolataj en la novaĵoj el Azio kaj Oriento.

Estas pli ol eble, ke mi, nura vizitanto, pli bone komprenis kaj estimis la paroladojn faratajn, pro tio ke oni uzis mian gepatran lingvon kiel komunlingvon, ol faris partoprenantoj. Ŝajnas strange, ke la Azia Konferenco decidis uzi la anglan kaj ne alian, almenaŭ orientan lingvon.

En pluraj kazoj la parolantoj bone parolis la lingvon, precipe Pandit Nehru, la hinda vicprezidanto, srno Sarojini Naidu (la hinda poetino, kiun oni nomas "la najtingalo de Hindujo") kaj Mahatma Gandhi. Sed multfoje, kiam la delegitaraj interpretistoj tradukis paroladojn, mi persone iom sentis, ke ili ripetas vortojn kaj sonojn sen plene kompreni la signifon. Kelkfoje ankaŭ la prononco de la vortoj estis tiel stranga, ke mi rekonis ilin nur post forta cerbumado kaj pro la ĝenerala senco de la tuta frazo.

Mi estas feliĉa, ke mi povis ĉeesti tiun ĉi konferencon, ĉar certe mi ne povos viziti la venontan, kiu okazos en Ĉinujo en 1949.

Post la konferenco bone konata hinda ĵurnalo longe pritraktis la demandon pri alia lingvo kiel helplingvo anstataŭ la angla. En dukolona artikolo la verkinto donis duonan kolonon al diskuto pri esperanto kaj ĝiaj meritoj. "Basic English" li

forigis per kelkaj frazoj. Mi mem ne povas imagi, ke homo kia estas Pandit Nehru, al kiu la angla estas preskaŭ gepatra lingvo, provus balbuti en la 850-vorta lingvo inventita de sro Ogden, precipe ĉar li ofte ne preparas siajn paroladojn!

*John Moffat.*

## Kolektiva respondeco

Ne nur kelkaj esperantistoj sed ankaŭ aliaj homoj, iuj kun vasta kaj profunda jura erudicio, subtenas la tezon, ke ĉiu germano estas respondeca pri la agoj de la Tria regno. La konsekvenco de tia rezonado estas, ke ĉiu ŝtatano en kiu ajn ŝtato estas respondeca pri la agoj de siaj ŝtatgvidantoj.

Kiam homo ege suferinta pro la Tria regno elkrias sian doloron kaj venĝemon kontraŭ ĉiu unuopa germano, oni povas kompreni kaj kompati lin. Pli grava kaj danĝera estas la afero, kiam fakuloj de ŝtata juro trankvile kaj serioze rezonadas en la sama maniero.

Homo povas efektive respondi nur pri siaj propraj individuaj agoj. Se mi konfidas al iu persono plenumi certajn taskojn kaj li trompas min kaj tio portas malutilon al tria persono, mi ŝuldas rekompencan al la tria persono, sed la kulpo ne estas mia.

Al mia rezonado oni eble respondas: "Se vi rimarkas, ke la ŝtatgvidantoj, kiujn vi elektis, malbone uzas sian potencon, vi devas forigi ilin kaj elekti novajn." La propono estas bona. Sed kion mi faru, se la gvidantoj ruze kaj sekrete jam prigrigis al si tiom de potenco, ke mia opozicio signifus morton al mi? Al la germanoj diras la subtenantoj de la kolektiva respondeco: "Eble vi ne povis forigi la reĝimon, sed se via opozicio kontraŭ ĝi estis serioza, vi estus devinta agi laŭ tio, oferi vian vivon se necese."

Ĉiuj ŝtatgvidantoj kaj ĉiuj homoj, kiuj okupis sin pri ŝtata etiko, ĉiam kaj ĉie asertis, ke oni en la ŝtata vivo ne povas



laŭlitere sekvi la vortojn de Kristo nek lian ekzemplon. La ekzemplo de Kristo kaj lia instruo estas idealo adorinda kaj ĝis certa grado imitinda sed ne realigebla en la reala mondo. — Sed jen oni subite postulas, ke ĉiu nehittlera germano estu plene egala al Kristo.

Verdire multaj miloj da germanoj tiel oferis sian vivon. Pri ili oni tamen ne parolas. Ĉu sinofero de centmil estus alportinta pli da utilo?

Kaj se oni de nun devas tiel sekvi la instruon de Kristo, la homoj en ĉiuj landoj, inkluzive ĉiujn grandpotencojn, devas entute rifuzi militservon.

Germanujo ne estas la unua ekzemplo en la historio pri tio, ke iuj homoj sendistinge rigardas tutan popolon kulpa pri la agoj de la gvidantoj kaj iliaj anoj. Certe ĝi ankaŭ ne estas la lasta.

Germanujo estas aktuala ekzemplo pri postulo pri kolektiva respondeco pri ŝtata agado. Sed tiu principo havas multe pli vastan signifon. Rekono de tiu principo signifas, ke oni identigas la individuojn, la homojn, kun la ŝtato. Sed la individuoj ne estas identaj kun la ŝtato.

La homoj, la individuoj, estas multe pli gravaj ol la ŝtatoj, kaj la individua respondeco estas la sola efektiva morala respondeco ekzistanta. Tion sentas en si ĉiu homo, eĉ se li estas ŝtatadoranto.

Kaj individua vivo kaj kolektiva vivo kun certa subpremo de la individuo estas faktoj, de kiuj ni ne povas forkuri. La unua estas fundamenta kaj grava, la dua estas aŭ devus esti efektive nur rimedo por helpi kaj perfektigi la unuan. Sed malofte tia ŝtato ekzistas. La ŝtato estas la ĉefa afero kaj celo en si mem, kaj la homoj estas "la sankta griza brutaro", kiel iu iam diris en Ruslando pri la soldatoj.

*Stellan Engholm.*